

Tiun lokon elektis elstara rusa regna aganto Bogdan Matvejeviĉ Ĥitrovo (1615–1680). La caro Alekseo ordonis al li krei ŝirman linion por fortigi regnajn limojn. De tie, de krono de Simbirska monto, oni povas bone vidi tre malproksimen, multajn verstojn supren kaj malsupren laŭ Volgo. Do tie oni fondis en 1648 la fortikaĵon Sinbirskon (de 1780 Simbirsko).

Poste la strategia pozicio perdis valoron. Nun tie simple belas. Krono de Simbirska monto, bulvaro Novij Venec, ĉiam logas por promeni. Uljanovsko estas verda urbo, ne nur pro Esperanta movado. Krom ĉi tiuj pentrindaj bordoj, nia urbo havas multajn lokojn por ripozi – de skvaroj kaj plaĝoj ĝis montoskiaj deklivoj kaj artefarita glacio.




Volgo

Krome, la urbo troviĝas en feliĉa loko: ĉi tie du riveroj (Volgo kaj ĝia fluanto Svijago) fluas renkonten unu al alia preskaŭ paralele.



Svijago

En la urbo estis loka sanktulo, St. Andreo Simbirskij (1763-1841). St. Serafimo Sarovskij paroladis al venintoj de Simbirsko: “Kial vi venadas al mi? Vi ja havas Andreon”.



Preĝejo honore al ĉiuj sanktuloj. Tie oni gardas relikvon de St. Andreo Simbirskij

Simbirsko havas riĉan literaturan historion. Ĝi enhavas famajn nomojn: N. M. Karamzin (1766-1826), D. V. Davidov (1784-1839), S. T. Aksakov (1791-1859), N. M. Jazikov (1803-1846/47), I. A. Gonĉarov (1812-1891) ktp.

Unu el vidindaĵoj estas monumento al Karamzin, kreinto de la “Historio pri Regno Rusia”, kiu aldonis al la rusa alfabeto literon «ë».



Nur en nia urbo estas monumento al litero “ë”[jo]



La monumento al Karamzin muzo. Lia busto modeste troviĝas en la niĉo



La domo de Nikolao Jazikov, poeto de Puŝkina plejado, deklarinta sin “poeto de ĝojo kaj ebrio” En 1833 tie gastis A.S.Puŝkin vojaĝinte por serĉi materialon por «Historio pri Pugaĉov»



Arta kaj regionstuda muzeoj

La domon oni konstruis per popolaj mondonacoj en 1914 memore al Ivan Aleksandroviĉ Gonĉarov (1812-1891), okaze de la centjara jubileo de la verkisto. Arta muzeo situas en la dua etaĝo, regionstuda muzeo – en la unua. Arta muzeo enhavas rimarkindan kolekton de pentraĵoj de grandaj pentristoj. Inter ili estas multaj originaloj.

Ivan Aleksandroviĉ Gonĉarov, kreinto de fama personaĵo Oblomov, naskiĝis kaj maturiĝis en Simbirsko. Tie do estas multe da memorindaj lokoj: la domo, kie Gonĉarov naskiĝis, Gonĉarova laŭbo kaj eĉ divano de Oblomov.




*Gonĉarova laŭbo – en ĝi okazis
rendevuoj de liaj literaturaj herooj
Vilaĝana milito (1773-1775) sub
gvido de Jemeljan Pugaĉov (1742-1775)*
okazadis precipe en Volgio. En Simbirsko li, kaptita, sidis en la kelo (subteraĵo) de la domo, en kies loko nun situas la drama teatro nome de I.A. Gonĉarov.



Nian urbon oni konas precipe kiel naskiĝurbon de Lenin. En Simbirsko Lenin (1870-1924), tiutempe Volodja Uljanov, naskiĝis, kreskis kaj studis ĝis 17 jaroj. Omaĝe al Lenin, en 1924, post lia morto, Simbirsko iĝis Uljanovsko. Dank' al zorgo pri Lenin-lokoj en sovetia tempo, oni gardis parton de malnova Simbirsko, muzeo sub malferma ĉielo. Sep domoj, kie loĝis Uljanov-familio, estas nun ekstere kaj interne la samaj, kiel en la XIX jc. Krome, oni aldonis al la komplekso aliajn muzeojn: pri urba ĉiutageco, pri metioj ktp. Tie vi povas ne nur rigardi, sed ankaŭ lerni iun metion. Vi sentos ĉarmon de malnova Simbirsko.

Bonvenon al Uljanovsko!

Aŭtoro: Jelena Tubalec



Simbirsko-Uljanovsko
fondita en 1648 j.

Urba
Esperanto-klubo
100 jaroj

